

## & Kanto de amanto:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 300 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versaĵaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:25> (/DoDo DoRe MiFa; SoSo SoFa MiSo; LaLa LaTi doLa; SoSo SoFa MiSo;

(#Rekantaĵe: FaFa FaMi ReDo TILA SO; Do MiRe Do Mi; Fa La do o)

)×12 )+

(&Strofoj:

'1 Junulino bela! ; Estas mia kanto ; Tiu de amanto ; Al vi ja fidela

(×:; **Kara junulino kredu min: ; Li en la koro ; amas ŝin!**)

'2 De l' liuto mia ; Estu la sonoro, ; Al la via koro ; Dolĉe simpatia .....

'3 Mia kanto revas ; Vian dolĉanimon; Mia voĉ' esprimon ; Koran al vi levas. ....

'4 Sub la klara luno, ; Ĝis la brido trilu, ; Via belo brilu ; pli, ol brilas suno; .....

'5 Brilu via belo ; Je ĉi tiu horo ; Por la mia koro ; Kvazaŭ norda stelo. ....

'6 Koro mia penas ; Trafi vian amon; Havi la balzamon ; Kiu de vi venas; .....

'7 Ĉar, ha mia Dio!, ; Via sento ama ; Al la mia flama ; Estu ambrozio. ....

'8 Mi vin ambicias ; Kore kaj senĉese; Al mi diru jese ; kion vi ja scias. ....

'9 Ne prokrastu dirojn, ; Mi petegas tion... ; Ŝatu l' iluzion! ; Aŭdu la sopirojn!... .....

'10 Belulin' gracia, ; Dir' de via buŝo ; Estu rava tuŝo ; Por la koro mia. ....

'11 Ĉar de l' kant' la forto ; Estas jam angora. ; Ne vi pli dolora ; Estu, ol la Morto! .....

'12 Vi rimarku tonon ; De la mia kanto. ; Via la amanto ; Donos al vi tronon! .....